

38 KAPTURNO

„La konscienco,” diris sinjoro Lacina, „tion oni ne plu tiel nomas; nun oni ĝin nomas subpremitaj imagoj, sed ĝi estas la sama kiel bati aŭ frapi. Mi ne scias, ĉu vi konas la kazon kun tiu fabrikanto Gierke. Li estis ege riĉa kaj nobelmora homo, granda kaj forta kiel kolono; oni rakontis, ke li estas vidvo, sed alie neniuj sciis ion pri li, tia malkomunikema karaktero li estis.

Kiam li estis multe pli ol kvardekjara, li enamiĝis al ia beleta malgranda ineto, dek sep jarojn ŝi havis kaj tiel bela ŝi estis, ke oni spirretenadis; jes la vera beleco vian koron ekpremas pro ia bedaŭro aŭ tenero. Kaj tiun knabinjon Gierke edzinigis al si, ĉar li estis granda kaj riĉa Gierke. Por edziĝvojaĝo ili veturis en Italion, kaj tie okazis jeno: En Venecio ili ascendis la faman kampanilon; kaj kiam Gierke ekrigardis malsupren - onidire ege bela panoramo - li paliĝis, turniĝis al sia juna edzino kaj falis kiel subfalĉita.

Ekde tiu tempo ankoraŭ li pli enfermiĝemis; ege li superregadis sin, nur por aspekti, ke estas nenio al li, sed li havis maltrankvilajn kaj malesperajn okulojn; sciu, lia edzino terure ektimis kaj forverturigis lin hejmen; ili havis belan domon vid-al-vidon al urba parko, kaj tie ekis lia strangemo: konstante li iradis de fenestro al fenestro por konvinkiĝi, ĉu estas bone fermite; kaj apenaŭ li sidiĝis, denove li saltleviĝis kaj iris al iu fenestro por fermi ĝin. Ankaŭ nokte li leviĝadis kaj fantomis en la tuta domo - ĉiujn demandojn li nur murmure respondis, ke li havas damnan kapturnon kaj ke li volas fermi la fenestrojn por ne elfali.

Lia edzino igis kradogarni ĉiujn fenestrojn, por senigi lin de lia senĉesa angoro. Kelkajn tagojn ĝi efikis, Gierke iom trankviliĝis, sed poste li denove kuradis de fenestro al fenestro kaj skuegis la kradojn por konvinki sin, ĉu ili firme rezistas.

Poste ili farigis ŝtalajn ĵaluziojn kaj vivis post ili kiel enkestigitoj.

38 ZÁVRAŤ

„Svědění,” pravil pan Lacina, „tomu se už tak neříká; teď se to jmenuje potlačené představy, ale to máte prašť jak uhod'. Já nevím, zná-li někdo z vás případ s tím fabrikantem Gierkem. To byl moc bohatý a takový nóbl člověk, veliký a silný jako sloup; říkalo se, že je vdovec, ale jinak o něm nikdo nic nevěděl, taková to byla uzavřená povaha.

Tedy když už mu bylo hodně přes čtyřicet, zamiloval se do takové hezoučké malé panenky, sedmnáct let jí bylo a byla tak krásná, že se až člověku dech tajil; tahle skutečná krása, to ti tak nějak sevře srdce takovou lítostí nebo něhou nebo čím. A to děvčátko si Gierke vzal, protože to byl velký a bohatý Gierke. Na svatební cestu jeli do Itálie, a tam se stalo tohle: V Benátkách vylezli na tu slavnou kampanilu; a když se ten Gierke podíval dolů – prý je to moc krásný pohled – , zbledl, obrátil se k své mladé paní a svalil se jako podřátý.

Od té doby se jaksi ještě víc uzavřel do sebe; strašně se přemáhal, aby to vypadalo, že mu jako nic není, ale měl takové neklidné a zoufalé oči. To víte, jeho panička se hrozně polekala a odvezla si ho domů; oni měli krásný dům do městských sadů, a tam propuklo Gierkovo podivínství: pořád chodil od okna k oknu přesvědčit se, je-li dobře uzavřeno; a sotva si sedl, zas vyskočil a šel k nějakému oknu, aby je zavřel. I v noci vstával a strašil po celém domě – na všechny otázky jenom brumlal, že má zatracenou závrať a že chce zavřít okna, aby z nich nevypadl.

Tu teda jeho paní dala zamřížovat všechna okna, aby ho zbavila té ustavičné úzkosti. Několik dní to pomáhalo, Gierke se drobet uklidnil, ale pak zase pobíhal od okna k oknu a lomcoval těmi mřížemi, aby se přesvědčil, že pevně drží.

Pak dali udělat ocelové okenice a žili za nimi jako zabeďněni.

Gierke per tio iom trankviliĝis; sed denove montriĝis, ke kaptas lin vertiĝo, kiam li estas irona la ŝtuparon; oni devis lin konduki sur la ŝtuparo kaj subteni kiel lamulon; kaj dume li tremis kiel folio, tute ŝvitkovrita; iam eĉ li devis sidiĝi meze de la ŝtuparo kaj singulte ploregis, tiom terure li timis.

Memkomprene, ili komencis venigadi al li ĉiujn eblajn doktorojn, kaj okazis, ke iu resanigisto diris, ke la kapturoj devenas de la laborlaco, alia, ke ĝi estas ia malsano de la labirinto, la tria, ke ĝin kaŭzas konstipo, la kvara, ke ĝin kaŭzas la cerba anemio; aŭskultu, mi observis, tuj kiam iu iĝas eminenta specialisto, estigas en li per ia interna procedo antaŭ ĉio vidpunkto. Tia specialisto poste diradas: Sinjoro kolego, el mia vidpunkto ĝi estas memkomprene tiel kaj tiel. Kaj la alia oponas al li: Jes, sinjoro kolego, sed laŭ mia vidpunkto la kazo statas diametre alie. Mi opinias, ke la vidpunktoj devus esti demetataj en antaŭĉambro kiel ĉapeloj kaj bastonoj; tuj kiam vi enlasas ien homon kun vidpunkto, certe li faros tie ian damaĝon aŭ almenaŭ malakordiĝos kun la aliaj.

Sed por ke mi ne deflankiĝu de Gierke, ĉiun monaton turmentis kaj kuracis lin alia eminenta specialisto laŭ tute alia metodo; tiu Gierke estis ulego kiel monto kaj eltenis tion; sed jam li ne povis leviĝi desur sia fotelo, ĉar la kapturo komenciĝis ĉe li, tuj kiam li ekrigardis teren, kaj tial li nur gapis en la mallumon, muta, senmova, kaj iam tute li ektremis: tio estis tiam, kiam li ploris.

Tiam komencis fari miraklojn iu nova doktoro, neŭrologo, li nomiĝis docento Ŝpic; tiu doktoro specialiĝis je tio, ke li kuracis la subprematajn kompleksojn. Nome, li diradis, ke preskaŭ ĉiu homo havas en la subkonscio diversajn terurajn imagojn aŭ rememorojn aŭ emojn, kiujn li subpremas, ĉar li timas ilin; kaj la subpremataj kompleksoj faras en li tumulton kaj malordon kaj la nervajn perturbojn. Kaj se lerta doktoro iel elpalpas kaj eltiras la subprematan komplekson al la hela lumo, la paciento eksentas mildigon kaj estas denove bone.

Gierke se tiam jaksi utiŝis; ale zas se ukázalo, že dostává závrať, když má jít po schodišti; museli ho na schodech vodit a podpírat jako chromého, a přitom se třásl jako list, celý zalit potem; ba někdy si musel uprostřed schodů sednout a škytavě vzlykal – tak strašně se bál.

To se rozumí, začali k němu volat všechny možné doktory, a jak už to chodí, jeden lazebník říkal, že ty závratě jsou od přepracování, druhý, že je to nějaká nemoc labyrintu, třetí, že to pochází od zácpy, a čtvrtý, že to způsobuje nedokrevnost mozku; poslouchejte, já jsem pozoroval, že jakmile se někdo stane vynikajícím odborníkem, tak v něm jakýmsi vnitřním procesem vznikne především stanovisko. Takový specialista potom říká: Pane kolego, z mého stanoviska je to ovšem tak a tak. A druhý mu namítne: Ano, pane kolego, ale z mého stanoviska se věc má diametrálně jinak. Já myslím, že by se měla stanoviska odkládat v předsíni jako klobouky a hole; jakmile někam pustíte člověka se stanoviskem, tak tam jistě natropí nějakou škodu nebo se aspoň nepohodne s těmi ostatními.

Ale abych se držel toho Gierka, tedy každý měsíc ho trápil a kurýroval nějaký jiný vynikající odborník podle docela jiné metody; ten Gierke byl chlap jako hora a vydržel to; ale už ani nemohl vstát ze své lenošky, protože dostával závrať, jakmile se podíval na zem, a tož jen vejřil do tmy, němý a nehybný, a někdy se jen tak celý zatřásl: to bylo, když plakal.

Tehdy začal dělat zázraky nějaký nový doktor, neurolog, docent Spitz se jmenoval; ten doktor Spitz se zařídil na to, že kurýroval tyhle potlačené představy. On totiž říkal, že skoro každý člověk má v podvědomí všelijaké hrozné představy nebo vzpomínky nebo choutky, které potlačuje, protože se jich bojí; a ty potlačené představy v něm dělají rotyku a nepořádek a takové ty nervové poruchy. A když šikovný doktor jaksi namákně a vytáhne tu potlačenou představu na světlo boží, pacientovi se uleví a je zas dobře.

Tia psikoanaliza kuracisto devas akiri absolutan konfidon de la koncerna paciento kaj elscii de li ĉion eblan: kion li songis nokte, kion li rememoras el sia infanaĝo kaj tiajn aferojn. Kaj fine li diras al li: Mia kara, antaŭ jaroj vi faris tian kaj alian sperton, kutime ion terure hontigan, kaj ĝi premis vin en la subkonscio - ni nomas tion psika traŭmo; jam ĝi estas malkaŝita, abrakadabra, kaj vi estas sana. Jen kia sorĉarto ĝi estas.

Mi diras al vi, ke tiu doktoro Ŝpic ververe sorĉis. Vi ne kredus, kiom da riĉaj homoj havas subprematajn kompleksojn; malriĉaj homoj ordinare ne tiom suferas pro ili. Mallonge, tiu Ŝpic havis fabelan klientaron. Kiam do ĉe Gierke estis alternigitaj ĉiuj medicinaj eminentuloj, oni venigis al li docenton Ŝpic; kaj doktoro Ŝpic deklaris, ke la kapturoj havas originon nur en la nervoj, kaj li, Hugo Ŝpic, garantias, ke li senigos la pacienton je ili.

Nu bone. Sed Gierke, homoj, ne emis paroli; eĉ se docento Ŝpic demandis kion ajn, apenaŭ li duonrespondis, poste li tute silentis kaj fine Ŝpic'on elĵetis. Doktoro Ŝpic estis malespera; mi petas vin, tia granda paciento, tio estas prestiĝa afero. Krome ĝi estis speciale bela kaj grava kazo de nerva perturbo. Krome sinjorino Irma estis ege bela kaj malfeliĉa. Kaj tial docento Ŝpic pasie absorbiĝis en la kazon. Mi devas trovi la subprematan komplekson de Gierke, li murmuris, aŭ mi lasos la medicinon kaj vendados silkon ĉe Löbl.

Li uzis do novan psikoanalizan metodon. Unue li konstatis, kiujn onklineojn, kuzinojn, bofratinojn kaj aliajn malmodernajn parencojn de ĉiuj gradoj kaj generacioj tiu Gierke havas; poste li klopodis akiri ilian konfidon - tia doktoro ĉefe devas scii pacience aŭskulti. La parencoj estis entuziasmaj, kiel ĉarma kaj afabla sinjoro estas tiu doktoro Ŝpic; sed doktoro Ŝpic fine komencis aspekti terure serioze kaj turnis sin al iu konfidinda kancelario, kiu sendis du fidindajn homojn ien vojaĝi. Kiam tiuj du revenis, doktoro Ŝpic pagis al ili por ilia penado kaj iris rekte al sinjoro Gierke.

Takovy psychoanalytický felčar si musí získat naprostou důvěru dotyčného pacienta a tahá z něho rozumy o všem možném: co se mu v noci zdálo, co si pamatuje ze svého dětství a takové věci. A pak mu nakonec řekne: Tak, člověče drahá, vy jste před lety udělal tu a tu zkušenost, obyčejně nějakou hrozně hanebnou, a ta vás v podvědomí tlačila – my tomu říkáme psychické trauma; teď je to venku, enyky benyky, čáry máry fuk, a jste zdrav. Tedy takové je to kouzelnictví. Já vám řeknu, ten doktor Spitz opravdu zrovna čaroval. To byste nevěřili, co bohatých lidí má potlačené představy; chudí lidé na to obyčejně tak netrpí. Zkrátka klientelu měl ten Spitz báječnou. Teda když už se u toho Gierkeho vystřídaly všechny lékařské kapacity, zavolali k němu docenta Spitze; a doktor Spitz prohlásil, ty závratě že jsou jenom nervového původu, a on, Hugo Spitz, že za to ručí, že jich pacienta zbaví.

No dobrá. Jenže Gierke, panečku, nenadělal mnoho řečí; ať se docent Spitz ptal, nač chtěl, odpovídal mu stěží na půl huby, potom vůbec mlčel a nakonec Spitze vyhodil. Doktor Spitz byl zoufalý; prosím vás, takový velký pacient, to je otázka prestiže. Krom toho to byl zvlášť krásný a těžký případ nervové poruchy. Mimoto paní Irma byla moc hezká a nešťastná. A tak se docent Spitz do toho případu zažral. Já tu Gierkovu potlačenou představu musím najít, bručel, nebo nechám medicínu a budu prodávat u Löbla hedvábi.

Tak na to šel novou psychoanalytickou metodou. Nejdřív zjistil, které tety, sestřenice, švagrové a jiné obstarožné příbuzné všech stupňů a kolen ten Gierke na světě má; potom si hleděl získat jejich důvěru – takový doktor musí hlavně umět trpělivě poslouchat. Ty příbuzné byly nadšeny, jaký je ten doktor Spitz roztomilý a pozorný pán; ale doktor Spitz nakonec začal vypadat strašlivě vážně a obrátil se k jedné důvěryhodné kanceláři, která poslala dva spolehlivé lidi kamsi na cesty. Když se ti dva vrátili, zaplatil jim doktor Spitz za jejich námahu a šel rovnou k panu Gierkemu.

Gierke sidis en duonlumo en fotelo; preskaŭ jam nekapabla moviĝi. Sinjoro, diris al li doktoro Špic, mi ne ĝenos vin; vi ne havas devon respondi eĉ per unu vorto. Mi demandas vin pri nenio. Temas ĉe mi nur pri tio, ke mi rivelu la kialon, kiu kaŭzas viajn kapturnojn. Vi forpuŝis ĝin en la subkonscion; sed la subpremata komplekso estas tiel forta, ke ĝi kaŭzas pezajn perturbojn.

Mi ne venigis vin, doktoro, interrompis lin Gierke raŭke kaj aletendis manon al sonorileto. Mi scias, diris doktoro Špic, sed ankoraŭ momenton atendu. Kiam atakis vin la kapturino unuafoje sur kampanilo en Venecio, rememorigu al vi, sinjoro, nur rememoru, kion vi dum tio sentis.

Gierke sidis rigide, fingron sur la sonorileto. Vi sentis, daŭrigis doktoro Špic, vi sentis teruran, frenezan emon deĵeti vian belan junan sinjorinon desur la kampanilo malsupren. Sed ĉar vi amis ŝin senlime, estiĝis en vi konflikto kaj ĝi malŝargiĝis per psika ŝoko; vi kolapsis pro la kapturino. Estis silente, nur la mano aletendita al la sonorileto subite sinkis.

Ekde tiu momento, parolis doktoro Špic, fiksiĝis en vi la kapturino, la hororo pro abismo; ekde tiu tempo vi fermadis la fenestrojn kaj ne povis rigardi en profundon, ĉar en vi senĉese estis la terurega imago, ke eble vi depuŝos sinjorinon Irma malsupren - Gierke en sia fotelo nehome ekĝemis. Jes, daŭrigis doktoro Špic, sed sinjoro, nun estas demando, de kie aperis la trudiĝema komplekso. Sinjoro Gierke, vi havis edzinon antaŭ dek ok jaroj. Sinjoro Gierke, via unua edzino pereis dum ekskurso en Alpoj. Ŝi falegis dum ascendo sur Hohe Wand kaj vi heredis post ŝi.

Estis aŭdeble, kiel Gierke rapide kaj stertore respiras. Gierke, vokis doktoro Špic, vi murdis vian unuan edzinon. Vi faligis ŝin en abismon; kaj tial, aŭdu, tial ŝajnas al vi, ke vi devas same mortigi ankaŭ la duan: tiun; kiun vi amas; tial vi timas la profundon; tial vi suferas pro la kapturino -

Gierke sedel v polotmĕ v lenoŝce, skoro uŝ neschopen pohybu. Pane, řekl mu doktor Spitz, já vás nebudu obtěžovat; nemusíte mi odpovídat ani slovem. Nebudu se vás na nic ptát. Mnĕ jde jen o to, abych vybavil příčinu, která způsobuje vaše závratĕ. Vy jste ji zatlačil do podvědomí; ale ta potlačená představa je tak silná, že vyvolává těžké poruchy.

Já jsem vás nevolal, doktore, přerušil ho Gierke chraptivĕ a vztáhl ruku ke zvonku. Já vím, řekl doktor Spitz, ale ještě okamžik počkejte. Když na vás poprvé přišel ten záchvat závratí na kampanile v Benátkách, vzpomeňte si, pane, jen si vzpomeňte, co jste přítom cítil.

Gierke sedel strnule s prstem na zvonku. Cítil jste, pokračoval doktor Spitz, cítil jste strašnou, šílenou chuť svrhnout svou krásnou mladou paní z té zvonice dolů. Ale protože jste ji bezmezně miloval, nastal ve vás konflikt a vybil se psychickým otřesem; vy jste se zhroutil závratí. Bylo ticho, jen ta ruka vztažená ke zvonku najednou klesla.

Od té chvíle, mluvil doktor Spitz, utkvĕla ve vás ta závrat', ta hrůza z propasti; od té chvíle jste zavíral okna a nemohl se podívat do hloubky, protože ve vás byla pořád ta děsná představa, že snad srazíte paní Irmu tam dolů - Gierke ve své lenoŝce nelidsky zastĕnal. Ano, pokračoval doktor Spitz, ale pane, teď je otázka, odkud se ta nutkavá představa vzala. Pane Gierke, vy jste byl ženat před osmnácti lety. Pane Gierke, vaše první paní zahynula na túře v Alpách. Zřítela se při výstupu na Hohe Wand, a vy jste po ní dědil.

Bylo jen slyšet, jak Gierke rychle a chrčivĕ oddechuje. Gierke, zvolal doktor Spitz, vy jste svou první ženu zavraždil. Vy jste ji srazil do propasti; a proto, slyšíte, proto se vám zdá, že musíte stejně zabít i tu druhou: tu, kterou milujete; proto se bojíte hloubky; proto trpíte závratí -

Doktoro, ekhurlis la homo en la fotelo, doktoro, kion mi faru? Kion mi faru kontraŭ tio?

Docento Ŝpic terure malgajiĝis. Sinjoro, li diris, se mi estus kredanta homo, mi konsilus al vi: submetiĝu al puno, por ke Dio pardonu vin. Sed ni doktoroj kutime ne kredas Dion. Tion, kion vi devus fari, kvitigu kun vi mem, sed el vidpunkto de medicino vi estas evidente savita. Leviĝu, sinjoro Gierke!

Gierke leviĝis, kalkpala. Nu, diras doktoro Ŝpic, ĉu vi havas la kapturon? Gierke kapneis. Vidu do, respiris docento Ŝpic. Nun pasos ankaŭ la aliaj sekvoj. La kapturo rezultis nur el la subpremata komplekso; nun, kiam ni eligis ĝin, estos bone. Ĉu vi povas rigardi el la fenestro? Bonege! Kvazaŭ ĉio falus desur vi, ĉu? Eĉ ne spuro pri la kapturo, ĉu? Sinjoro Gierke, vi estas la plej bela kazo, kiun mi iam havis!

Doktoro Ŝpic plaŭdigis la manojn pro entuziasmo: Perfekte resanigita! Ĉu mi darfis venigi sinjorinon Irma? Ne? Ho, vi volas ŝin mem surprizi - dio, kiel ŝi ĝojos, vidante vin iri! Jen vi vidas, kiajn miraklojn faras la scienco! - Pro la ĝojo super la sukceso li babilus du horojn, sed li vidis, ke Gierke bezonas trankvilon; li preskribis do al li bromon kaj adiaŭis. Mi akompanos vin, sinjoro doktoro, diris Gierke ĝentile kaj kondukis la doktoron ĝis la ŝtuparo. Kiel strange, eĉ ne spuro pri ia kapturo, eĉ ne spuro - Hura, ekkriis docento Ŝpic entuziasme; vi sentas vin sana, ĉu?

Absolute sana, diris Gierke mallaŭte kaj rigardis malsupren post la doktoro. Kaj kiam post docento Ŝpic brufermiĝis la dompordo, estis aŭdebla ankoraŭ unu peza falo. Post nelonge oni trovis malsupre sub la ŝtuparo la korpon de Gierke. Li estis morta, kelkoble rompita, karambolinte dumfale balustradon de la ŝtuparo. Kiam oni anoncis tion al doktoro Ŝpic, li ekfajfis kaj rigardis ege strange antaŭ sin. Poste li prenis libron, en kiun li enskribadis siajn pacientojn, kaj al nomo de Gierke li alskribis nur daton kaj unu vorton: Suicidium. Sciu, sinjoro Tausig, ĝi signifas memmortigo."

Doktoro, zavyl ten člověk v lenošce, doktoro, co mám dělat? Co mám proti tomu dělat?

Docent Spitz hrozně zesmutněl. Pane, řekl, kdybych byl člověk věřící, poradil bych vám: podstupte trest, aby vám Bůh odpustil. Ale my doktoři obyčejně nevěříme v Boha. To, co máte udělat, si vyřídíte sám se sebou, ale lékařsky jste patrně zachráněn. Vstaňte, pane Gierke!

Gierke vstal, bledý jako vápno. Tak co, povídá doktor Spitz, točí se vám hlava? Gierke zavrtěl hlavou. Tak vidíte, oddychl si docent Spitz. Teď přejdou i ostatní následky. Ta závrať byla jen z potlačené představy; teď, když jsme ji vybavili, bude dobře. Můžete se podívat z okna? Výborně! Jako by z vás všechno spadlo, že? Ani památka po závratí, co? Pane Gierke, vy jste nejkrásnější případ, jaký jsem kdy měl!

Doktor Spitz spráskl nadšením ruce: Dokonale uzdraven! Smím zavolat paní Irmu? Ne? Aha, vy ji chcete sám překvapit – bože, ta bude mít radost, když vás uvidí chodit! Tak vidíte, pane, jaké zázraky dělá věda! – Byl by samou radostí nad tím úspěchem žvanil dvě hodiny, ale viděl, že Gierke potřebuje klid; tož mu předepsal nějaký bróm a poroučel se. Doprovodím vás, pane doktoro, řekl Gierke zdvořile a vedl doktora až ke schodům. To je zvláštní, ani stopa po nějaké závratí, ani stopa – Tak sláva, křikl docent Spitz nadšeně; tedy se cítíte zdrav, že?

Naprosto zdrav, řekl Gierke tiše a díval se dolů za doktorem. A když za docentem Spitzem zabouchla domovní vrata, bylo slyšet ještě jedno těžké zuchnutí. Za chvíli našli dole pod schodištěm tělo Gierkovo. Byl mrtev, několikrát přelámán, jak narážel při pádu na zábradlí schodiště. Když to ohlásili doktoru Spitzovi, hvízdal a díval se moc divně před sebe. Potom vzal knihu, do které si zapisoval své pacienty, a ke Gierkovu jménu připsal jen datum a jedno slovo: Suicidium. Abyste věděl, pane Taussig, to znamená sebevražda."